

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO

EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

n-ro 4/1986

septembro 1986

P a c e m a B e r t a K i n s k á - S u t t n e r

Mi volas kompletigi la informon "Pacema Berta" en la n-ro 2 de nia Bulteno kaj la supozon pri ŝia esperantisteco. Dank' al perado de s-ano Josef Petera en Skřivany, gvidanto de Esperantorondeto Berta Kinská, ni sciigas pri iuj pluaj detaloj el artikolo en "Vlastivěda Královéhradecka". (Mi ellasas, kion ni scias jam el la "Bulteno")

Berta Kinská estis senlaca porpaca batalantino. Ŝi konatiĝis persone kun L. N. Tolstoj (la unua honora prezidanto de la Vegetarana Asocio Esperantista - rim. de J. M.), Nobel, St. Zweig... Kinská laboris en la londona Internacia porpaca societo, fondis aŭstrian porpacan societeton kaj partoprenadis porpacajn kaj esperantistajn kongresojn. En 1899 ŝi prelegis ĉe konferenco pri malarmado en Hago. Post la morto de sia edzo (1902) ŝi prelegturneas en Usono kaj estas akceptita de prezidento Theodor Roosevelt. Sentima humanisto ŝi plu laboris en la atmosfero de la proksimiĝanta unua mondmilito. Ŝia klopodo trovis rifuzon inter ŝia grafa parenkaro kaj inspiris la militemulojn al kolero kaj moko.

Laŭ ŝia nereкта instigo la usona riĉulo Andrew Carnegie kreis fonduson de 10 milionoj da dolaroj por konstruo de la Palaco de Paco en Hago.

Post la morto de Kinská-Suttner (1914-06-21 en Vieno), ŝia literatura postlasaĵo transiris en 1931 en la bibliotekon de la Ligo de Nacioj en Ĝenevo.

Pluan informon J. Petera akiris el la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno: "En la antaŭparolo de la libro *For la batalilojn* estas menciite, ke Kinská-Suttner sendis telegramon al la dresdena Esperanto-Societo, ke "Esperanto kaj la pacifismo estas gekuzoj" kaj plue ke en 1906 ŝi rekomendis Esperanton al Heinrich Arnold."

Kaj mi aldonu, ke ŝi eldonadis en Dresdeno monatan gazeton "Die Waffen nieder!" ekde 1892. Ŝia samnoma romano kontraŭmilita estis tradukita en la plimulton de la eŭropaj lingvoj, ĉefe sub la titolo "Odzbrojte!", 1896, kun la aŭtor-nomo Berta ze Suttnerŭ, trad. Vlasta Pittnerová. Deponita en la Ŝtata biblioteko en Praha, sub la signo 63C152.

Berta ze Suttnerŭ-Kinská testamentas al ni: "En la epoko de eksplodaĵoj la perforto akiris tian formon, ke restas unusola alternativo – aŭ la fino de la homa gento aŭ la fino de la perforto. Ni esperas je la dua. La homaro estas tro juna kaj la estonteco ĝin atendanta tro bela ol ke ĝi devu fali en pereon."

Jaroslav Mařík

Mortis s-ano Hujucz

Esperantaj gazetoj raportis pri la morto (16.01.1986) de s-ano Hu Yuzhi (Hujucz), prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo. Kial ni rememoras lin en nia Bulteno?

Hujucz laboris dum 60 jaroj por akiri al Esperanto agnoskitan lokon en Ĉinio. Li kunfondis la Ŝanhajan Esperanto-Asocion kaj dank' al lia influo aperas de 1950 la revuo El Popola Ĉinio. En la publika vivo Hujucz havis gravajn postenojn, ekz. vic-ministro pri kulturo, vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso (parlamento).

En la pasinta jaro s-ano Hujucz turnis sin al nia klubo kun invito al la Universala Kongreso de Esperanto 1986 en Pekino. Hujucz konservis agrablajn rememorojn pri Prago. En la jaro 1956 ni

akompanis lin tra la ĉefurbo kaj fine kune sidis en la panoramvida restoracio Na Nebozízku. S-ino Šustrová atentigis min, kiel impresita li estis de nia informo pri la esperantigo de la ĉeĥoslovaka konstitucio fare de ĉeestanta tradukinto (laŭ nia traduko aperis en 1951 en Ŝanhajo la ĉinlingva traduko). La ĉina samideano informis nin ankaŭ pri sia laboro en la Komitato por Skriblingva Reformo (t.e. latinigo de la ĉina skribsistemo), kies vicprezidanto li estis.

Hujucz invitis min al sia hotelo (Flora) por mallonga vizito, dum kiu li transdonis al ni memoraĵojn, ĉinajn bildojn kun sia dediĉo. Ĉe la adiaŭo la prezidanto akompanis min ĉinstile ĝis la ŝtuparo kaj surprizis min per ĝisgenua riverenco, kiun ripeti malhelpis min (ankoraŭ nun mi iom hontas) la nekutimeco kaj mia embarasiĝo. Unu el la bildoj pendis poste dum kelkaj jaroj surmure en la tiama kunvenejo de la kluba junularo (kunvenestro studento V. Novobilský) en la Blinduldomo (Krakovská 21) ĝis la disiro de la junularo. Alia bildo plu ornamas mian loĝejon, kun la dato de la dediĉo-teksto 2. VII. 1956.

Fine de la lasta jaro mi skribis al s-ano Hujucz, memorigante lin pri lia ŝatata vizito en nia urbo. La respondo ne venis kaj ne plu venos. Ankaŭ la UK en Pekino li ne ĝisvivis.

Jaroslav Mařík

Kongresurbo 1986: Pekino

Arkeologoj konstatas, ke en la loko de la hodiaŭa urbo vivis la homoj jam 2 mil jarojn antaŭ nia epoko. Ĝis la 10a jarcento de nia epoko estas ĝi konata kiel urbo Tji. De la jaro 936 ĝi estas ĉefurbo, de kie regis diversaj dinastioj kaj de la jaro 1912 ankaŭ ĉefurbo de ĉina respubliko. (Nur en la jaroj 1927 ĝis 1949 estis la ĉefurbo Nankino.)

La historio de Pekino ne estis ĉiam tro trankvila, kvankam ĉina teritorio izolaciis sin antaŭ cetera mondo. Kelkfoje ĝi estis konkerita, ekzemple de mongoloj, manĉuroj, japanoj kaj aliaj.

Nun la 8-miliona urbo estas centro kultura, politika kaj industria (maŝina, elektronika, ĥemia, tekstila, energetika ktp.). En Pekino estas multaj altlernejoj, muzeoj, bibliotekoj. Malgraŭ ke "kultura revolucio" difektis multajn kulturajn valoraĵojn, eĉ nun oni trovas tie multajn historiajn kaj arkitekturajn vidindaĵojn, por kies konservo nun la ŝtato elspezas grandajn sumojn.

Al la feliĉuloj, kiuj partoprenis la kongreson, ni povas nur envii, ĉar la kongresurbo kaj kongreslando por ni eŭropanoj estas ĉiuflanke lando nekonata kaj certe interesa.

Jindřich Ondráček

Brazila epizodo

Mi tramveturis el mia laboro hejmen. Malfrua posttagmezo. Kiel oftas en tropik-landoj, pluvis antaŭ unu horo, sed nun la suno ree ardis kvazaŭ fajrujo. Kelkloke, en ombro de domoj, ankoraŭ kuŝis flakoj. La aero tie estis pli agrabla.

La tramoj en Rio de Janeiro estas ambaŭflanke senpordaj kaj la ascend-ŝtupo samlongas kun la vagono. Mi sidis ĉe la benkofino. Ĉiutage mi veturis tie ĉi, tamen ĉiam estis io rigardinda. Kalejdoskopoj de koloroj kaj homoj, domoj, nekonataj arboj kaj fruktoj, alispeca kutimaro, sonado de fremda lingvo – ĉio tiel diferenca disde tio, kion oni konas el sia patrujo.

Min absorbis plu la ŝanĝiĝantaj scenoj, kiam min subite trafis el la strato abunda ŝpruco de kotakvo. Paralele kun la tramo veturis luksa sentegmenta aŭto.

Ĝi abrupte traveturis la kotflakon, la koto dise ŝprucis, ho terure – mia helkolora pantalonon aspektis ĉokolade. Tiumomente la tramo atingis la stacion kaj ekhaltis. La aŭto same devis halti. Ĝia stiristo troviĝis je man-etendo. Li estis juna, ĉarmeta negro en plaĉa uniformo, per kiu vestas sian servistaron la grandaj moŝtuloj. Mi koleris ege, mi rigardis alterne sur lin kaj sur mian difektitan pantalonon. Mi ne sciis esprimi mian animstaton portugale, kion mi tiumomente pensis ĉeĥe, kaj ĉar mi devis pervorte senpezigi mian koron, mi elspulis sur lin mian indignon ĉeĥlingve. Nenio deca estis en tio. La vortojn mi ne elektis kaj mi dubas, ĉu mi kuraĝus skribi ilin.

La stiristo aŭskultis kun buŝo disa de unu orelo al la alia, en okuloj flirtis flametoj. Min tiu rideto preskaŭ frenezigis. La kondukto fajfe signalis, ke "la descendo kaj ascendo" finiĝis, kiam la

negro en la aŭto ekvoĉis per kerneca praga ĉeĥlingvo: "Hele, kamaráde, nerozčiluj se! Já za to nemoh', ale až se jednou sejdem "U Kalicha", tak to zapíjem. Na shledanou! Ať žije plzeňský!"

La tramo ekveturis, la aŭto same. Ankoraŭ tempeton ni veturis paralele. Mi rigardegis lin kun malfermita buŝo. Li ridis, kaj mi fine ankaŭ. La aŭto malaperis iom post iom kaj mi ekstaris kaj svingis, mansvingis, ĝis la aŭto malaperis en la urbega tumulto.

Laŭ Rudolf Špilar (Praha) en "Svět v obrazech" trad. J. M.

Vlasta Burian estis konata ĉeĥa aktoro, reĝisoro, humoristo. Jen lia plej konata programero:

P a r e n c e n i g m o .

"Mi estas mia propra avo."

"Ĉu vi freneziĝis?"

"Ne, mi ne freneziĝis. Aŭskultu, kiel tio okazis. Mi edziĝis kun vidvino ĉirkaŭ kvardekjara kaj mia patro, ankaŭ vidvo, edziĝis kun ŝia filino. Mia duonfilino tiel fariĝis mia duonpatrino kaj mi, edzo de ŝia patrino, do ŝia patro, samtempe fariĝis ŝia filo. Poste naskiĝis al mia edzino kaj edzino de mia patro filoj. Mi fariĝis avo de la filo de mia patro, mia nepo estis samtempe mia frato kaj bofrato de sia avino, nome de mia edzino. Mia patro, kiu edziĝis kun mia filino, fariĝis bofrato de sia propra filo, ĉar li havis lian fratinon kiel edzinon kaj li, kiel mia patro, estas samtempe avo de mia filo kaj mi estas avo de lia filo, estante laŭleĝe praavo de mia filo kaj kiel praavo de mia filo mi devas esti mia propra avo."

"Elhistikigis H.Š."

Taskoj de niaj kursanoj pri ekskurso:

La ekskurso en la naturon.

Mi apartenas al tiuj homoj, kiuj amas arbojn, arbarojn, montetojn kaj montojn. Tial libertempante mi ŝatas veturi en tiujn pejzaĝojn de nia patrujo, kie troviĝas ĉi tiu bela naturo. En nia ŝtato estas ankaŭ multe da memorindaj konstruaĵoj. Survoje en la naturon ni povas ofte viziti ian burgon, kastelon aŭ nur ruinon. Ankaŭ ni povas trarigardi la subteran kaj malvarmetan belecon de grotoj. En la montaro bonvenigas nin freŝa aero, serena tempo, trankvilo kaj murmurado de riveretoj. Se ni frumatene ellitiĝas, ni povas vidi la sunleviĝon. Kaj tio estas belega spektaklo. Antaŭ la tagiĝo ĉiam komenciĝas la birda koncerto. Unue aŭdiĝas kelke da nekuraĝaj triloj el diversaj deklivoj kaj poste komenciĝos la koncerto sen direktanto. Vespere ravas min la sunsubiro. La oranĝa, brilanta globo malrapide kaj majeste malleviĝas malantaŭ la horizonton. En la montojn kaj la arbarojn instalos sian regadon la nokto kaj la tuta naturo silentiĝos. La libertempo rapide pasas kaj ni revenas al la ordinaraj tagoj.

Křesinová

Nia ekskurso.

La ekskurso de nia familio en la naturon estas ĉiam plena de aventuroj. Komenciĝas tio matene tiel, ke neniuj povas trovi siajn aĵojn. Post zorgemaj preparoj dum la antaŭa tago estas nenio sur sia loko. La filino ne povas trovi la zorgeme gladitan jupon, la filo ne havas la kvadratan ĉemizon, la edzino perdas bonan humoron kaj mi havas la nervojn for.

Kaptinte en la lasta memento la aŭtobuson, la humoro de ĉiuj pliboniĝis. Tiam ni veturas jam en la naturon. Post konstato, kion ĉion ni forgesis, ni estas surloke. La dia trankvilo.

Sed post la tagmanĝo oni aŭdas pli kaj pli ofte voĉon de radio kaj murmuradojn de aŭtomobiloj. La trankvilo estas for. Ni forĵetas la lastajn paperojn kaj pakas niajn aĵojn. La impresoj de la bela ekskurso perdiĝis en la plenŝtopita aŭtobuso.

Sed ne forkonsilis nin tio. Venontsabate ni reveturos.

Ing. Ludvik Veselý

Ni ne forgesu maldankeme niajn eminentajn klasikulojn.

D-ro Stanislav Schulhof:

Dr. Stanislav Schulhof:

S o v a ĝ a k a n t o

D i v o k á p í s e ŝ

Foje en aŭtuno, kiam birda aro
sin pretigis flugi ien trans la maro,
kiam en la parko velkis lasta flor',
tiam ankaŭ mia kanto bela, juna
eksopiris je la lando varna, suna
kaj kun birda svarmo flugis de mi for.

Kdysi v podzim, když už z našich niv a hájů
odlétalo ptactvo do zámořských krajů,
poslední když vadnul list již na větvích,
tenkrát také moje píseň mladá, milá,
po krajinách jiných, cizích zatoužila
a odlétla s ptáky v teplý, slunný jih.

La printempo venis en sekvinta jaro
kaj de sud' kun birda petolema aro
venis ankaŭ mia forfluginta kant';
ni ĝin kompreneble logis, kapti penis,
sed la sovaĝulo min jam ne komprenis
kaj sin al mi kaŝis ie en lekant'.

Když však s novým jarem v naše sady, nivy
navrátil se ptací národ skotačivý,
přilétla též píseň moje najednou;
lákal jsem ji ovšem, chytit chtěl ji zase,
ale zdivočela v kratičkém tom čase
a se v trávě skryla někde přede mnou.

Tial, se vi kanton mian koni volas,
serĉu en natur' ĝin, kie vivo bolas,
sed ne en la libroj, ie sur paper';
inter papilioj, muŝoj, floroj ĉarmaj,
sur herbejo verda, en radioj varmaj
mia kant' petolas ie sur la ter'.

Pročež moji píseň poznati-li chcete,
ven a v teplý život do přírody jděte,
nehledejte však ji nikde ve knihách;
mezi ptáky, květy, v šumném mušek rejí,
v slunci, v trávě někde je teď úkryt její,
skotačí však někde v hustých křovinách.

Mi ne scias, kie vi ĝin serĉi devas,
kie ĝi sin kaŝas, kie nune revas,
aŭ ĉu je vi ridas ie en sekret';
eble ĝi fariĝis bonodora floro
kaj ĵus hejmen portas ĝin sur juna koro
ia sopiranta, bela knabinet'.

Nevím sám, kde teď by k nalezení byla,
kde teď sní, či kde se zrakům vašim skryla,
možno, že i odkuds směje se vám v líc;
možno, že i v květ se proměnila v lese,
který na svém srdci mladém právě nese
domů hezká dívka, láskou vzdychajíc.

Tiu ĉi poemo estis tradukita ankaŭ en la germanan (fare de Kolonelo Franz Zwach), polan kaj francan lingvojn.

Ne forgesu aŭskulti ĉiutage la Esperanto-programojn de RADIO POLONIA:

6.30 – 7.00 horo, ondoj: 41,27, 48,90, 50,04 kaj 200 m (7270, 6135, 5995, 1503 kHz)

12.00 – 12.25 horo, ondoj: 31,50 kaj 41,99 metroj (9525, 7145 kHz)

16.30 – 16.55 horo, ondoj: 31,01 kaj 41,18 metroj (9675, 7285 kHz)

17.30 – 17.55 horo, ondoj: 41,18 kaj 49,22 metroj (7285, 6095 kHz)

20.30 – 21.00 horo, ondoj: 41,18 kaj 49,22 metroj (7285, 6095 kHz)

22.30 – 22.55 horo, ondoj: 41,18, 49,22, 50,04 kaj 200 metroj (7285, 6095, 5995, 1503 kHz)

La horoj estas laŭ la vintra tempo.

Nia eminenta poetino Eli Urbanová fariĝis membro de Akademio de Esperanto. Al ŝia honoro ni aperigas tiuokazan poemon.

Jan Pečený

NEVELKANTA ROZO (al Eli Urbanová)

Mi volus glori vin en versoj,
prikanti vian sorĉan belon,
sonori je floroj per vento,
dancigi tutan altĉielon.

Mi volus glori vin en versoj.
Dum tagoj, noktoj, eĉ sen fino
mi devas – ho ve – nur pensadi
jen pri vi, mia ĉarma ino.

Mi volus glori vin en versoj,
al mi jam ne sufiĉas prozo.
Tremante mi kuraĝas diri;
Vi estas NEVELKANTA ROZO!

Eli Urbanová

Aparta signo

Laŭ mia edz'

Tiom mi deziris
ian havi!
Per ĝi ravi!
Silkon mi disŝiris.
Fi! Mallaŭdo.
Blanka haŭto.

Laŭ mia edz',
al kiu multajn dankojn,
de la gepatroj
heredis mi nur mankojn.

Dio kun kompato
vidis tion:
Havu ion!
De nun sur manplato
jen fortuno:
Sun' kaj luno.

Ja aŭdas mi,
pardonon, eĉ tro ofte,
ke mi naskiĝis
por peki tage-nokte.

Brrr... Havas mi
neniun bonan econ.
Se vi ne kredas,
demandu mian edzon!

Cirka ĉevalo

Parade ek! Trof'! Piruet'!
Pasiru! Pranc'! En ritma danc'
laŭ la tamtam'! Antaŭen jam!
Galop'! Kaj hop!

Adiaŭpoz'. Ĵetita roz'.
La lasta hen'. Faulk' de l' kurten'.
Nu, sinjorin'? Tre dolĉa fin':
Dank' per suker'.

(El la nova poemaro de Eli Urbanová
"Verso kaj lamo")

La programo de kunvenoj de la Klubo de esperantistoj en Prago

Septembro:

- 1.9. La Tutmonda Tago de la Paco – Patera
8.9. Libera tribuno
15.9. Esperanto kiel ĉiutaga lingvo – Howard
22.9. Elstaraj faktoj de nialanda Esperanto-historio – Mařík
29.9. Trarigardo de la Esperanto-gazetaro – Štruncová

Oktoebro:

- 16.10. Jiří Kořínek 80-jara – Mařík
13.10. Ligo de Nacioj pri Esperanto – Ondráček
20.10. La arto "insulti" en Esperanto – Patera
27.10. Trarigardo de la Esperanto-gazetaro – Štruncová

Novembro:

- 3.11. Per Esperanta tra Balkano I. (diapozitivaj) – Šperling

La kunvenoj de la Praga Klubo okazas ĉiulunde inter la 18.30 kaj 20.00 h en la klubejo en Malešice - Zharadní Město, Malinová 25.

La 2-an de oktobro 1986 ĝisvivus 80 jarojn nia elstara membro, poeto kaj poezi-tradukinto, eminenta lingvokonanto D-ro Tomáš Pumpr. Li mortis la 10-an de septembro 1972.

S-anino Bedřiška Řeháčková donacis al nia klubo 300,- Kčs. Elkoran dankon pro la valora donaco!

En aŭgusto vizitis nian klubon la gvidaj agantoj de la Agado E₃ (Esperantistoj esperigas esperantojn) fruntloke kun s-ro J. A. Tuinder. Ili rakontis pri la aktivecoj de E- kaj projekciis lumbildojn. Oni funkciigis tri optikajn laborejojn en Ganao, pluan en Karnerunio, en Nikaragvo oni instalas brjalopresejon RUBEN DARIO kaj en Hindujo oni planas starigi duan Socialan kaj Medicinan Centron. La ĝisnuna – neesperantista – Medicina Centro kuracis en la pasinta jaro 18 265 homojn, konsultejo por beboj kaj etuloj registris 15 628 vizitojn. La surrada kliniko, veturanta en la periferiaj vilaĝoj, kuracis 17.400 pacientojn. Sed la plej granda zorgo koncentriĝas ĉirkaŭ la lepruloj, kiuj abundas en Hindujo. Oni kurace helpis ĝis nun al pli ol 25 000 lepropacientoj.

Oni konstatis, ke la optikaj laborejoj en Ganao povas fari sian laboron dank' al la helpo de esperantistoj el pluraj landoj. Nelaste Orienta Eŭropo konkretigas tre valorajn iniciatojn. Kiom da okulvitroj jam forsaltis el Ĉeĥoslovakio, Hungarujo, Pollando, Germanujo, Italujo? Multe da dankoj al Prof. D-ro Rudolf Horský en Ĉeĥoslovakio kaj pastro Lajos Kober en Hungario, kiuj sukcese sendis pezajn transportojn da okulvitroj al Ganao.

B U L T E N O de Klubo de Esperantistoj en Praha (loka grupo de ĈEA), p.k. 1069, 111 21 Praha 1.
Redaktas: Kultura komisiono ĉe la komitato de la Klubo de Esperantistoj en Praha.